

## AVENO #36 - Ekologio kaj Ekonomio

2010-10-01 ghis 2011-05-27

### --- Agendo 21 & Demokratio & Politiko ---

La tuta teksto "Ekologio & Ekonomio" rilatas al la Agendo 21 - dauripova evoluo – jen kelkaj sub-chapitroj:

- Rememor-Tagoj & Jaroj
- Atomenergio
- Energio, ŝparado, kreado
- Naturprotektado & konfliktoj pri energio kaj resursoj & Homfaritaj Katastrofoj
- Tutmondaj informoj pri natur-media politiko kaj NRO-oj
- Agrikulturo, Nutrado, Sano
- Ekologio & Ekonomio
- Trafiko, Transporto
- Financoj, Impostoj
- Demandoj & Petoj & Privataj informoj

2011-06-03/05: Bonn, **kongreso pri rezistopovaj urboj de ICLEI** (Urbaj Administradoj por Daurigeblo): ili diskutas kaj proponas rimedojn por fari la urbojn pli daurigeblaj - transporto, energio - laŭ la **Agendo 21 (Aalborg)**: <http://www.iclei.org>

---

La art. **11a de TEU** (Traktato de EU), rajtigas **leĝproponojn je popola iniciato**, prezentindaj al la Eŭropa Komisiono kaj subskribitaj de almenaŭ unu milono da EU-civitanoj.

Sed tiuj leĝoj je popola iniciato, konsistigantaj la partoprenan demokration, ne estas ankoraŭ aplikeblaj manke de la regularo antaŭvidata de la art. 2a de TFEU (Traktato pri funkciado de EU), Tamen la Eŭropa Komisiono ne povos ne konsideri la petojn de unu milono da civitanoj. Kaj ja la Komisionano pri Sano kaj politiko de konsumantoj respondis al la du respondeculoj ke li "atente priekzamenos" la proponojn, aldonante ke "la mezuroj aprobitaj en la pasinta julio de la Komisiono, kaj specife la propono adesita al la Eŭropa Parlamento kaj al la Eŭropa Konsilio, antaŭvidas ke la decidoj pri kulturado de Gmo estu alprenataj, laŭ la intereso de la civitanoj, de la membroŝtatoj kiuj rajtos limigi aŭ malpermesi la kulturadon ankaŭ pro motivoj ne rilatantaj al la sano kaj la medio".

Esperantigo de hieraŭa informo de la itala presagentejo AGI. (Tradukis J-K Rinaldo)

Aldono (AVE/mw): La Europa Patent-Administrejo finfine provizore malakceptis patentojn sur biologie breditaj organismoj, ekz-e speco de Brokkoli kaj Tomato. (Bavara Radio, 2010-12-10)

**Lobiada korupcio en EU:** la europa aŭtoritato pri nutrajho-sekureco (EFSA) estas gvidata de sino Diana Banaiti. La problemo estas ke ŝi ankaŭ sidas en la Internacia Instituto por la Vivo-Sciencoj (ILSI) de la GMO-industrio.

La ekspertizo de EFSA estas la bazo de la decidoj de la EU-Komisiono - do, fakte la industrio decidas super la politiko. José Bove, franca membro de la EP de Europe Ecologie (Verduloj) pro tio postulas la abolicion de tiaj permesoj. (2010 - eble ŝi jam eliris la postenon ?)

### --- Rememor-Tagoj & Jaroj ---

2011: **Internacia Jaro de la Arbaroj**

2011-04-27 **Internacia Tago Averti la Bruon** (detaloj sube)

2011-04-26: **25-jarigho de la Chernobila Atom-katastrofo:** Informoj de la Heinrich-Boell

Fonduso: <http://www.tschernobyl25.org/>

Ne forgesu: Ankoraŭ dum jarcento la tiam elpushitaj radioaktivaj isotopoj Cezio-137 kaj -134 kaj Stroncio-90 trovighas en la chirkauajho. Oni ne scias precize kiom da homoj intertempe mortis tro frue pro tiu radioaktiva poluo (ĉefe de duona Europo); sed vivas homoj kun reduktita sano kaj infanoj kun san-difektoj. Multobligo de tiroida kancero estis nur unu el la plej certe atribueblaj sekvoj de chernobilo (pro la Jodo-131).

2011-03-16 **Fukushima** (detaloj - pli sube)

1956 & 1979 Pli frue okazis katastrofoj en: **Harrisburgo (Usono) kaj Majak (1956, SU).**

### 2010-10-10 **Tago de la Monda Klimato**

Sociaj movadoj el la tuta mondo mobiliziĝas por la 16-a Konferenco de la Partioj (**KOP16**, angle : **COP16**) organizata de la **Kadro-Konvencio pri la Klimatŝanĝiĝo de UNO** (UNKKK) okazonta en Kankuno de la 29-a de novembro ĝis la 10-a de decembro.

La KOP15 en Kopenhago vidigis nekapablon de registaroj fronti la radikajn kaŭzojn de la nuna klimata ĥaoso. Lastmomente, Usono maldemokrate trudis la t.n. "Kopenhagan Interkonsenton", provante elpuŝi la debaton el UNO kaj Kiotaj promesoj kaj ankoraŭ pli celkonscie favori libermerkatajn solvojn. legu pli je: <http://satesperanto.org/Milojn-da-Kankunoj-por-klimata.html>

Preskau chiuj **religioj postulas atentemon kaj singardemon en la sociaj, socialaj kaj ekonomiaj rilatoj.** (budhismo: Publik Forum, 2010/24, p.14): <http://esperanto.us/budhana.html>

### --- Atomenergio ---

#### **Eliri el la atomenergio:**

Germanio jhus decidis - post moratorio - ke la 7 plej malnovaj atomreaktoroj ne plu laboros. Tio signifos, ke ili estos malkonstruotaj dum jardeko. Ankoraŭ ne okazis decido kiom longe rajtas funkcii la restantaj 4 - supozeble ghis 2021.

Svisio jhus decidis finadon de la atomenergio malshalti unu post la alia ghis ch. 2034. (2011-05-27)

Pollando celas konstruigi atomreaktorojn ??

*Komento de AVE/mw:* Krom la konataj riskoj estas la financa temo: Oni povas investi monon nur unufoje. Prefere en la uzadon de regajneblaj energioj. Pollando estas vasta maldense loĝata lando kun granda potencialo.

#### **Riskoj de la Atomenergio:**

Jen pluraj dokumentoj pri la atomenergio, inter ili plej detale: Pli ol **100 bonaj argumentoj kontraŭ la atomenergio** (dank' al EWS civitana provizejo de kurento el regajneblaj resursoj): (de, eo) <http://www.verduloj.org/energio.htm>

De regiona tri-landa inform-asocio Ecotrinova (CH, DE, FR):

Ili prezentas i.a. prelegon pri statistiko, kiu montras la san-efikojn de kelkaj atom-katastrofoj de Chernobil kaj la iamaj proveksplodoj de atom-bomboj, kies radioaktiva pluvo poluis la tutan mondon. Unu el la tiuj efektoj estas la **naskiĝo de malpli da infanoj kaj aparte relative malpli da knabinoj.** Mi klopodos "distili" ghin kaj prezenti la detalojn sur la sub-pagharo:

<http://www.verduloj.org/energio.htm>

<http://ecotrinova.de/pages/samstagsforum/samstagsforum-2011.php>

2011-01-23, **Cattenom, franca atomcentralo, radioaktive poluis la akvon pro tralasiva ventilo.** La akvo restas sur la areo de la uzino; tamen ghi estis inform-deviga akcidento (INES 0). (BUND Freiburg, JPLacote, 2011-01-23)

**Historio de la batalo kontraŭ atomenergio ambaŭflanke de la Rejno** (Alsaco & Sud-Badeno): <http://www.badisch-elsaessische.net/>

**1986-04-26 Ĉernobilo** - radioaktiva trezoro: raporto pri personoj kiuj serchas valorajn metalajhojn kiuj postrestis post la katastrofo en la "zono".

Parte la materialo atingas la normalajn merkatojn... **filmeto de la serio "verduloj"**

[http://www.youtube.com/watch?v=BHhon9zE14U&feature=player\\_embedded](http://www.youtube.com/watch?v=BHhon9zE14U&feature=player_embedded)

2011-04-08 ch. 1 miliono da homoj mortis ghis **25 jaroj post la atom-katastrofo de Chernobilo.**

Oni trovas en suda Germanio, 2000 km for de tiu loko, alt-radioaktive poluitajn bestojn, ekz-e sovaghajn porkojn, kiujn oni devas forbruligi.

Lau kalkulo (Jablokov kaj Pflugbeil ) de la sekvoj de malalt-radioaktiva poluado rezultis averagha redukto de la vivodauro je 4% en la koncernaj regionoj; kaj el tio sekvas ke homoj kiuj mortis pro Chernobil estas pli ol unu miliono. Aliflanke IAEO nombris nur 50 mortintojn, kiuj tre rapide mortis post la katastrofo. Aldonendas i.a. granda nombro da kancerroj, aparte de la tiroido, kiu ne gvidas al morto, se oni havas bonan medicinan servon. (taz, 2011-04-08, p.18)

Pli en Esperanto: <http://www.verduloj.org/energio.htm> > 100 argumentoj - bone dokumentita.

#### 2011-03-11 **Fukushima:**

Kolektanta dosiero pri la sekvoj de la Fukushima-Katastrofo :

(de) <http://www.sonnenseite.com/Aktuelle+News,+Japan-Dossier-+Notstand+in+Japan,6,a18526.html>

2011-03-16 **Japanio, Fukushima (Tertremo & Cunamo & Super-PSA** (Plej granda Supozebla Akcidento)) intertempe montrighas ke en kazo de bezono ni ne devus esperi ke urgh-bezona elektroprovizo kotopo chiam funkcius.

Radioaktiva Cezio kaj Jodo abundas en la akvo-nuboj, kiuj venas el 4 de la 6 reaktoroj de Fukushima - felice por la japanoj la vento direktighas ilin al la maron kie ghi estos iomete diluita. Kaj fumo montras ke eble jam la radioaktiva fuelo-materialo Pu kaj U liberighas, kiu plie minacos la sanon - ne nur de la homoj.

Do, en mia regiono inter Alsaco (FR) kaj Badeno (DE) trovighas la malnova reaktoro de Fessenheim, pli norde la germana de Philipsburg kaj iomete pli sude pluraj svisaj atomreaktoroj. Bonvolu voĉdoni en la franca radio-stacio France 3: Oui (jes) por fermer (malhalti) la atomcentralon de Fessenheim.

<http://alsace.france3.fr/info/fukushima-et-fessenheim-risques-comparables---67813162.html>  
(info dank' al Georg Loeser <[georg.loeser@gmx.de](mailto:georg.loeser@gmx.de)> kaj <[newsletter@energie-waldkirch.de](mailto:newsletter@energie-waldkirch.de)>

"Nun alvenis por la alia flanko de la mondo la katastrofo de **Fukushima**; kie felice oni ghis nun sukcesis eviti la fandighon de la plej granda parto de la brul-stangoj. Alikaze povus okazi ech pli grandskala poluado de la mondo."

*Komento AVE/mw:* tion mi skribis kiam alvenis la unuaj informoj; sed evidente la japana registaro & TEPCO ne informis komplete. Jam pro la tertremego okazis problemo pri (kelkaj) brul-stangoj en 3 de la 4 atomreaktoroj de Daiichi 1 (Fukushima). Ili meltis (parte) kaj nun trovighas surfunde de la kontenero. Pro tio granda amaso da radioaktivaj elementoj (J, Cs, Sr, Pt, U, ..) eniris la akvon, kion ili uzis amase por malvarmigi la ardajhon. ...

Sed la daura eligo de Jodo kaj Cezio jam poluis sufiche grandan areon ĉirkaŭ la atomcentraloj, kaj aparte - pro la pluvo - trovighas t.n. "varmegaj makuloj" - do areoj kie la maro, grundo, legomoj, herboj kaj bestoj estas poluitaj super la oficiala "akceptenda" limo. Nun oni fermis la 20-km areon por loghado. Sed tio ne tute sufichos.

Chie en la mondo vi povas legi kio okazas ĉiutage; en Esperanto vi trovas taglibron de HORI Jasuo sur la retejo de SAT:

(eo) <http://satesperanto.org/-Taglibro-de-nia-Kamarado-Yasuo-.html>

#### Fukushima: **Algoj kolektas radioaktivajhon**

Verdpaco esploris algojn en la maro ĉirkaŭ Fukushima kaj trovis je duono de la specimenoj radioaktivan enhavon po kilogramo de pli ol 10.000 Bq; tio signifas pli ol 5-obla de la tolerata lim-valor.

Je la 20-a de Majo tradicie tie komencas la rikolto da algoj. Verdpaco atentigas la aŭtoritatulojn mezuri la rikolton. (2011-05-12, Verdpaco, laŭ Franz & Biggi Alt, [Sonnenseite.com](http://www.sonnenseite.com))

2011-04-03 **Fukushima:** radioaktiva akvo fluadas en la oceanon el granda fendo sub la reaktoro de bloko 2; tio parte komprenigas la altan radioaktivecon (de Jodo kaj Cezio) en granda areo.

Surloke estas altega radiado (1000 milli-Sievert) kiu malebligas la reparaturon de la elektra sistemo. Enfluigi betonon ne funkciis - nun oni klopodas per kemiaĵoj shtopi la fendon. La tragedia katastrofo ne finighis. (vidu viajn naciajn informilojn). La bona konsekvenco estas ke oni re-pripensas en multaj landoj chu atomenergio entute taugas por la mondo.

#### 2011-03-21 Fukushima-Raporto & Tertremo:

la japana registaro nombris pli 18.000 da mortintoj pro la cunamo.

La reaktoroj de Fukushima plistabilighas dank al la sukceso rehavi kurenton por la malvarmigo preskau chiuj reaktoroj kaj fuelstabo-stokejoj.

Sed la reaktoro 3 ankoraŭ restas ne-stabila - oni devus denove ellasi vaporon por redukti la premon kaj tiel denove venos radioaktivaj partikloj en la chikraŭon. Jam la trinkakvo estas polutia pro la radioaktiva pluvo en la barlagojn, kaj ankau legomoj estas poluitaj, kaj estos enterigata. Oni ne raportas kiom alta estas la poluo - supozeble per Jodo (mallongtempa) kaj Cezio (longtempa). (AVE/mw, lau diversaj inform-fontoj)

#### 2011-03-18 Fukushima-Raporto:

La registaro konstatis, ke la nivelo de la nuklea akcidento estas same kiel tiu de Three Miles Island en Usono (Harrisburg, 1979).

Por malvarmigi la reaktoron, hodiaŭ oni faris jenajn aferojn:

Antaŭ la dua horo posttagmeze, oni ĵetis 50 tunojn da akvo en la 3an reaktoron el specialaj fajrokamionoj. Ŝajne estis iom da efiko, ĉar oni povas vidi vaporon el la centralo.

Oni provis refunkciigi elektran sistemon damaĝitan per la cunamo, kiu ebligas malvarmigi la reaktorojn. Tamen en la tereno ekzistas forta radioaktiveco, do oni povas fari tion malrapide. La respondeculoj volas, ke la sistemo refunkciu ĝis morgaŭ.

En televido anoncistoj simple raportas, ke oni klopodas fari iujn aŭ aliajn aferojn en la nuklea centralo de Fukuŝima, sed en kia kondiĉoj laboristoj tie laboras? La 15an, TV raportis, ke 750 simplaj laboristoj fuĝis ekster la centralon kaj restas 50. Hodiaŭ aperis artikolo pri tiuj laboristoj. Mi resume tradukas la vortojn de unu el tiuj fuĝintoj:

“Kiam okazis la tertremo, mi estis en la centralo. Atakis min grandega tremo, kaj tuj poste atakis grandega cunamo, kiu forportis ĉiujn bluraĵojn kaj maŝinojn. Ni strebis refunkciigi la sistemon por malvarmigi la centralojn, kolektinte ĉiujn bateliojn, sed vane. Kelkcent laboristoj alterne laboris por la riparado, sed postaj tertremoj nuligis niajn ĉiujn strebojn. Ni ne povis bone dormi pro la sinsekvaj tertremoj, nek manĝi pro streso. Ekmankis akvo kaj ĉiuj plendis pro malbona sanstato. Ni demandis nin, kiom da radioaktiveco ni ricevis, ĉu la reaktoroj eksplodos kaj ĉu granda kvanto da radioaktiveco ŝprucos sur multajn homojn. Mi foje pensis, ke la kompanio forĵetos nin, tamen samtempe ni decidis, ke ni ne rajtas forlasi tiun ĉi lokon ĝis la popolanoj povu vivi trankvile”. Por bonteni nukleajn centralojn, elektraj kompanioj bezonas multajn laboristojn, ĉar laŭ la strikta leĝaro estas malpermesite al tiuj laboristoj ekspone sin al pli ol la difinita kvanto da radioaktiveco. Tial ili ofte laboras nur kelkajn minutojn tage por ke ili ne plu ricevu pli da radioaktiveco ol la limkvanto. Ordinaraĵoj ne volas fari tian vivriskan laboron, tial la kompanioj ofte varbas senlaborajn homojn en grandaj urboj, proponante altan salajron, pere de suspektindaj, nigraj organizoj, nome jakuza, japanaj mafioj. La kompanioj ĉiam fanfaronis pri tio, ke nukleaj centraloj estas sukuraj kaj atom-energio estas pura, sed malantaŭ la luma scenejo estas tia malbelaĵo.

Jen miaj tankaĵoj, tradiciaj japanaj poemoj kun 5-7-5-7-7 silaboj:

(lau kim J: henriksen tra <[esperantodk@yahoo.co.uk](mailto:esperantodk@yahoo.co.uk)>) <[kimjezus@plakaten.dk](mailto:kimjezus@plakaten.dk)>

Homoj kutime  
salute promenadis,  
sed nun senvorte  
interrenkontas ĉiuj  
en printempa krepusko.

Malaperis lum'  
malaperis pasantoj  
en la urbcentro.  
La katastrofo fora  
ventas ankaŭ ĉi tien.

Ĝis hodiaŭ estas  
Mortintoj: 6548  
Malaperintoj: 10354  
Rifuĝintoj: 280463  
en 2304 rifuĝejoj.

Nombro de mortintoj pro la cunamo superis tiun de Hanŝin-Awaĵi-tertremo en Koobe en 1995.

### **Liberalaj kaj konservativaj EU-parlamentanoj volas pli da atomenergio.**

En la Europa Parlamento okazis voĉdono por resolucio pri la finado atomenergio - memorante la katastrofon en Fukushima, kaj ankaŭ la pli fruajn katastrofojn. Jen la plej gravaj postuloj:

1. Malhalti laŭpase - plejble rapide - la funkciantajn atomreaktorojn
2. Ne plu konstrui novajn atomcentralojn
3. Sekvi energiopolitikon kiu altigas la efikan uzon de (elektra) energio, kaj preferas la ne-fosiliajn, regajneblajn energi-fontojn.

sed ghi ne ricevis la akcepton.

Malgraŭ la konsento fare de ĉiuj parlamentanoj, ke sekureco esta plej grava afero, tamen la Liberaj kaj Konservativaj voĉdonis kontraŭ la proponita resolucio. (de, en, fr)

<http://www.greens-efa.eu/nuclear-safety-in-europe-following-the-nuclear-accident-in-japan-3519.html>

Chi-riate parolis Rebecca Harms kaj Claude Turmes, ambaŭ energio-specialistoj de la verdaj MEP-oj: ne plu riski la ampleksan riskaron de la atomenergia pado (de la ekspluatado - daŭra emisio da radioaktivaj isotopoj - ghis la ankoraŭ ne-solvita etern-daŭra stokado de radioaktivaj rubaĵoj) sed uzi ĉiujn fortojn por la alternativa vojo rigarde la energi-provizon kaj klimato-shanghighon. (Press-Info: Greens/ EFA , 2011-04-07 )

---

Grandaj manifestacioj kontraŭ la **atomenergio** okazos

en Germanio je la 28a de Majo: (de) <http://ausgestrahlt.de/>

Ankaŭ en aliaj landoj civitanoj batalas kontraŭ la atomenergio:

(Francio: <http://www.sortirdunucleaire.org/>

Verduloj en Japanio, Midori no Mirai (jp) <http://www.greens.gr.jp/>

Tutmonde - Amikoj de la Tero (en) <http://foe.org/>

### **Uranio-ekspluatado aparte minacas la naturparkon Selous en sud-okcidenta Tanzanio.**

Pri la parko (de): [http://www.game-reserve.com/tanzania\\_selous\\_gr.html](http://www.game-reserve.com/tanzania_selous_gr.html)

Jen eblas sendi protestleteron kun argumentoj al la prezidento Kikwete kaj al la ĉefministro Pinda: <http://www.regenwald.org/mailalert/709/uranmine-bedroht-weltkulturerbe>

NRO-oj por atentema minado-ekspluatado, tutmonde: (de, en) <http://www.uranium-network.org>

krome - sed ne pri tiu projekto (en) <http://www.earthworksaction.org/home.cfm>

kaj

NRO en la regiono Mara - por kunlabora helpo:

[http://www.africanbiodiversity.org/content/foundation\\_help](http://www.africanbiodiversity.org/content/foundation_help)

(lau la germana NRO Regenwald, 2011-05-21)

---

### **Rusio: forbrulado de Plutonio en Beloyarsk.**

Se ne okazos grava akcidento tiam estus bona metodo "bruligi" la Plutonium de atomarmiloj en bredil-reaktoro kun likva natrio kiel malvarmiga medio, kiel okazos en Beloyarsk en la Uralo.

Beloyarsk 3 nun laboras dum 30 jaroj - la plej malnova bredil-reaktoro; sed nun oni komencas uzi ghin ne por produkti Plutonium sed por bruligi ghin. (DLR, 2010-10-03, 16:30)

---

### **ne nur Francio - atomreaktoroj distribuas radioaktivecon tute normale !**

Cezio-137 trovighas sur la grundo de la Rejno-kanalo kiu malvarmigas la atomcentralon de Fessenheim.

Ekz-e de la radioaktiva isotopo de Hidrogeno Tricio (H-3) 23.340 miliardoj Becquerel (bekerel) estis ellasitaj, kio eĉ estas malpli ol la lim-valoru. En formo de (radioaktiva) akvo au metabolita molekulo ghi eniras la organismojn kaj en ili ghi estas danghera. (lau BZ, 2010-10-14, p. 8) - pli da detaloj vi trovas sur nia retejo:

[http://www.verduloj.org/100\\_arg/100\\_Argum\\_12\\_19\\_eo.htm](http://www.verduloj.org/100_arg/100_Argum_12_19_eo.htm)

---

### **Kien la radioaktiva rubajho de la tuta mondo ?**

En **Rusio** plejmulto troviĝas en bareloj subĉiele, parte oni enfluigas likvajhon en riverojn, au en subteraj fendo-kavoj. La katastrofo de Majak (1957) okazis pro tia metodo.

Rusio akceptis atomrubajhon el Germanio kaj Francio; nun ekz-e el Germanio, de malnova esplor-reaktoro Rossendorf de iama GDR.

**Usono** ne havas stokejon por eterne. Komence oni enfluigis radioaktivan rubajhon en riverojn. La iam provizita Yukka-Montaro nun ne plu servos.

**Chinio** stokas la radioaktivan rubajhon de siaj 12 reaktoroj prefere surloke, sed nun ili kolektighos en la provinco Gansu, proksime de Lanzhou (je la Flava Rivero). Aliflanke ili klopodas eluzi la materialon pleje en recikla maniero - kiu plialtigas la dangheron.

**Francio** reciklas la brulstangojn en La Hague, la radioaktiva elfluejo eniras la Atlantikon. Tite oni ankaŭ prilaboras ne plu taŭgan brulajhon el **Germanio**, eltiras miksitan oksidon (Pu + U) por denova bruligado kaj resendas la radioaktivan rest-rubajhon al Germanio, kie ĵus alvenis trajno kun 11 Kastoroj (gigantaj konteneroj, ch. 100 tunoj pezaj), kiuj shirmas plejparte kontraŭ la radioaktiveco. Ili nun estas sokataj en giganta halo proksime de Gorleben, sude de Hamburgo.

**Svisio kaj Francio** intencas uzi argilan tavolon subteran en Benken kaj Bure, respektive.

**Germanio** denove serĉas - oni spertis ke salminejo ne estas stabila (Asse, kie dronos multaj prove jhetitaj bareloj, se oni ne elfosos ilin denove), kaj NRO-oj volas haltigi la esploron de la proksima salminejo Gorleben; kaj pro tio - aparte ĉar la germana registaro plilongigas la daŭron de la atomreaktoroj je mezume 12 jaroj - okazis tutlandaj protestoj, kaj ankaŭ en Francio.

### **--- Energio, shparado, kreado ---**

**Aktualigo de niaj Energio-konsiloj**, okaze de la atom-energia katastrofoj (2011-05-08):

La unua metodo devas esti redukti la bezonatan kurenton. Jen malmultaj ekzemploj:

Fridujo devas esti bone izolita, kaj stari prefere en malvarma loko;

kaj tiuj por kampingo-vagonoj (skoltado ?) ja uzas kontinuan kurenton, kion vi povas stoki per akumulatoro. Eble oni povas redukti la dimension de la fridujo - ĉu oni bezonas frostujon ?

Kuir-forno, se ĝi uzas kurenton, estas plej efika kiam per indukto oni nur varmigas la kuir-poton, eĉ pli rapide ĉar ankaŭ la vando estas hejtgata. Sed ne ĉiuj kuir-potoj taŭgas; ĝi devas esti magnetizeblaj. do, aluminio kaj kupro ne funkcias.

Investi en pli novan aparaton au eĉ teknikon tiel povas doni profiton jam post malmultaj jaroj.

Intertempe lumo estas tute efika per LED-oj, sed tio estas ankoraŭ multekosta, kaj eble ne tiom agrabla kiel la plenspektra lumo de ard-bulbo. Sed por kelkaj areoj ja sufiĉas tia lumo. La alia tekniko de fluoreskaj bulboj, kiuj havas 4-oblan lumefikon kompare kun la ardantaj havas la malavantaghon ke ĝi uzas hidrargan vaporon en ties atmosfero - do, necesas plena sistemo por mal-poluanta reciklado. La vivodaŭro de la fluoreskaj estas pli alta ol tiu de la ardantaj, sed LED-oj eĉ multe pli longe vivas (lau mia informo).

Kompreneble - la elektronikaj aparatoj (radioaparato, k.tp.) kiuj estas daŭre ligitaj al la kurento-linio devas havi shaltilon, kiu komplete malshaltas. Vi povas kontroli tion per mezurilo kiun vi metas por prov-tempo inter la aparato kaj la konektilo. Unu mezurilo povas servi por tuta urbo - ĉar la kondiĉoj (kutimaj aparatoj) ja tute similas.

Ni uzas la varman akvon de la sunkolektoroj sur la tegmento ankaŭ por niaj lavmashino (ĝi havas enirojn kaj por varma kaj por malvarma akvo) kaj vasar-lavmashino.

Detala informo pri la **energi-shparantaj lumigiloj**, kiuj havas aliajn malfacilajhojn:

1. La ampoloj enhavas hidrargo-vaporon.

2. La lumo ne estas tiom "bela" - necesas elekti la taŭgan tipon.

nun nur en la germana (konciza informo en eo eble venos):

(de) <http://umweltinstitut.org/fragen--antworten/energie/rohstoffe/energiesparlampen-706.html>

3. Intertempe ekzistas la plej nova generacio: LED-oj, kiuj uzas la energion plej efike.

## --- Naturprotektado & konfliktoj pri energio kaj resursoj & Homfaritaj Katastrofoj ---

### **Ekologie pozitivaj forcejdomoj je la marbordo de sekaj regionoj.**

<http://www.seawatergreenhouse.com.au>

2011-05-09, Chilio planas HydroAysen: 5 gigantajn **barlagojn en Patagonio** por kurento. La NRO-oj protestas kaj rakontas ke la proceduro akcepti tiun projekton estis ne sufiĉe travidebla. Oni detruos grandajn areojn per la barlagoj, kaj la kurento-trako estos same giganta: 2.000 km kun largheco de minimume 100 m. La nordo volas havi la kurenton por la industrio, ktp..

74% de la civitanoj kontrauas kaj protestas. Jen kelkaj retejoj:

(cn, en, es, pt) <http://www.internationalrivers.org/de>

(en) [http://salsa.democracyinaction.org/o/2486/p/salsa/web/common/public/content?content\\_item\\_KEY=9480](http://salsa.democracyinaction.org/o/2486/p/salsa/web/common/public/content?content_item_KEY=9480)

Tre bonaj & belaj diagramoj (es) <http://patagoniasinrepresas.tumblr.com/>

---

Atentu: la filmo **Neodim en Vektoradoj** nun ne estas videbla en Youtube pro neklara rajtigo.

(la URL ne plu alireblas publike) <http://www.youtube.com/watch?v=7zq9dMwKWgg>

Jen koncize pri kio temas:

Kelkaj tipoj da vento-radoj, vento-generatorj, uzas t.n. permanentaj magnetoj; tiel ghia konstruado estas malpli kosta.

Temas pri ventoradoj ekz-e de la firmaoj Vestas kaj Siemens, dum Nordex kaj Enercon uzas ghis nun alian metodon.

La problemo estas, ke tiaj permanentaj magnetoj enhavas neodimon, elemento el la grupo da Raraj Terajhoj. Nuntempe ili estas produktataj ĉefe en Ĉinio, Baotai (Interna Mongolio). Krome: kune kun neodimo aperas la radioaktiva Torio. La ekspluato kaŭzas gravan poluadon de la medio pro la lagoj da rub-akvaroj kaj sekve de tio ankaŭ de la grundakvo. Pro tio kelkaj putoj ne plu estas uzeblaj - en seka regiono. Do, la kamparanoj plendas.

China Verdpac-ano (Greenpeace) diris, ke la okcidentaj landoj shovis tian produktadon al Ĉinio.

*Komento AVE/mw:* Fakte, Ĉinio dum multaj jaroj ofertis la Rarajn Terajhojn ej tiom malalta prezo, ke aliloke oni fermis la minejojn.

Lau mia demando je la firmao Nordex ili respondis, ke nun ili ne uzas neodimon, sed eble poste por pli grandaj mashinoj (povumo de ĉ. 6 MW), kaj tiam ili postulus natur-konvenan produktadon sen poluo. (la filmo aperis komence de 2011 en la germana TV-magazino Panorama de la NDR)

---

### **Rusio minacas kaj malliberigas naturdefendantojn:**

La arbaro de Chimki apartenas al la verda zono ĉirkaŭ la urbogiganto Moskvo.

La registaro planis auto-shoseon tra la arbaron de Chimki - proksime de Moskvo. Ĉar arbaroj estas leghe protektataj, Putin (la sistemo) faris escepton.

La shoseo estu la unua private financata publika projekto en Rusio, do, kelkaj firmaoj povus profiti - inter ili la franca konzerno Vinci. La civitanoj protestadas - pluraj estis arestitaj (Aleksej Gaskarov kaj Maksim Solopov, krome Denis Solopov en Kievo); kelkaj jhurnalistoj estis premitaj per reprezalioj. En multaj rusaj urboj okazis solidareco-manifestacioj.

(de) <http://de.indymedia.org/2011/03/302889.shtml>

(diversaj lingvoj & ru) <http://khimkibattle.org/>

(lau diversaj fontoj kaj Adam Federman, LMD (germana) 2011-05, p. 23)

### **Porko-Balenoj bezonas trankvilon.**

La porko-balenojn en la Balta Maro minacas formortigado. Unue ili estas kaptitaj ne-intencite de grandaj fishistaj retoj, en kiuj ili mortas, sufokighas. Due en la Balta maro enfluas ankoraŭ tro da nutraj substancoj, kiuj kaŭzas, ke parto de la profundaj areoj estas senvivaj. Nun alvenas la minaco per bruego.

Bone, ke oni pli kaj pli konstruas "en-marajn vento-parkojn" por produkti kurenton preskaŭ sen

fosiliaj resursoj; sed la konstruado bezonas tiajn resursojn. Oni devas atentigi la birdojn, kiuj shajne ne tro estas ghenataj de la muelilaj flugiloj. Sed la metado de la fundamentoj en la marfundon kausas bruegon dum longa tempo. Kiel konata, balenoj kaj aliaj marbestoj estas torturataj de forta bruo, kiu en la akvo estas distribuata pli fore ol en la aero. Necesas kunlabori kun la sciencistoj - ekz-e en Stralsund - kaj akcepti kelkajn limigojn au fari rimedojn por protekti la marbestojn. Pro tio oni evoluis "bobelan muron", muro da aer-bobeletoj kiujn oni ellasas el hosoj chirkau la konstru-loko. Tiaj problemoj ne nur estas ne la Balta Maro. (diversaj lingvoj): <http://www.wdcs.org/> (pri bruo: lau ARD, Natur-sciencaj informoj, 2011-05-14)

---

Pawel informis nin, ke la pola Verda Partio „Zieloni 2004“ ankau subtenas la **peticion por la praarbaro en la nord-oriento**. Se vi ne bone komprenis kion mi sendis antau du tagoj: Temas pri tio, ke nur 17% de tiu Praarbaro en Pollando estas protektata, kaj la Verda Movado (pluraj organizoj) postulas ke ghi estos protektata entute. Kelkaj demandis, chu eksterlandanoj rajtas subskribi la peticion: lau ghenerala opinio de pluraj poloj: JES, char ne temas pri formala popola vochedonado. (en, pl) <http://www.zieloni2004.pl/art-3797.htm> (subskribi nun ne plu indas)

---

La jena artikolo temas pri unu el la multaj projektoj en P.R.Chinio en la autonoma Provinco **Tibeto (cn: Xinghai) krei barlagojn por energio kaj transporti akvon al la chinaj metropoloj**. Kiel tre ofte, ankau en Hindio, oni devigas la kamparanojn translokighi sen konvena rekompenco por daurigebla memdecida (sustenebla) vivo; la alia afero estas la perdo de la hejma kulturo. <http://www.rfa.org/english/news/tibet/relocations-12092010131710.html> (2010-12 de Radio Free Asia, kiu raportas pri chiuaj aziaj landoj)

---

2011-02-27 Chinio minacas la fragilan (senteman) **ekologian de Tibeto**: [http://www.tibet-initiative.de/de/aktionen/aktuelle\\_aktionen/greentibetfreetibet/](http://www.tibet-initiative.de/de/aktionen/aktuelle_aktionen/greentibetfreetibet/)

---

Tajvano: jen agado por protekti marbordan vivejon de “**Ĉinaj blankaj delfenoj**”. Laŭdire, se granda kompanio konstruos petrolea fabriko tie, “Ĉinaj blankaj delfinoj” (nomo de specio) malaperos. Ghenerala pagho - kun bildo de la blanka delfeno: (tw) <http://www.sow.org.tw> Ghenerala pagho en la angla: (en) <http://sow.org.tw/english/> Antau chirkau jaro, oni komencis kampanjo por ke shtatanoj are achetu la terpecon, anstatau granda kompanio achetu ghin por fari fabrikon. Por fari tion, oni kampanjis, ke oni elspezi po chirkau 30 euroj, kaj se oni havos 50 mil homojn, oni povos acheti tiun terpecon je prezo, pli alta ol tiu, kiuj Tajvano proponas vendi al tiu granda kompanio. (lau Qiyao el Tajvano)

La **Asocio por Protekti la Sovaghejoj, de Tajvano**, purigis marbordojn. Ni kolektis multajn rubajhojn, kaj ordigis ghin lau specoj por fari statistikon. Ne nepre forjhetita de marbordaj ludantoj, sed eble el fishkaptistaj shipoj. (de Qiyao 2010-10-23)

---

### **Norda Koreio agas malsaghe:**

Lau ordono de la registaro oni devis forhaki grandaree arbarojn. Ekde miloj da jaroj oni spertis ke arbaroj tenas la grundon kaj suchas la pluvakvon kiel spongo, krome ili mildigas la klimaton, kaj donas diversajn rikoltojn. Komence de printempo la kamparanoj devas elfosi la shlimon el la glaci-varmaj riveroj (nudpiede - char gum-botoj ne estas), por remeti ghin al la kampoj. Se ili ne faras, la rapidiga fluo transportus tian grundon en la maron.

(lau B. Bartsch, raporto de eksterlanda diplomato, BZ, 2011-05-17, p. 3)

*Komento AVE/mw:* Estas nur malmultaj landoj kie la registaro per stranga "religio" (Ju-Che - au simila) malrichigas kaj katenas la popolon, dum la nomenklaturado vivas lukse. Mi rememoras al la japana libro "Chu ili diris la veron?", eldonita de SAT - en ghi rakontas fughintojn pri kontrau-homecaj pun-metodoj silentigi la popolon. Ankau tiu sistemo ne dauros eterne.

---

### 2010-10-31 Irano, vespere 19:30 filmraporto pri Irano - **Lago Orumiyeh en danghero – Flamengoj/ Fenikopteroj ankau.**

La lago Orumiyeh kovras areon de 5500 km<sup>2</sup> - tio estas ch. 10 foje la Lago de Konstanco. Per konstura aktivado oni endangherigas la lagon - ne-korekta konstruo de ponto estas unu el la problemoj. La shtato shanjne ne interesigas pri tiu oazo por fenikopteroj; NRO kiu klopodas protekti la lagon kaj ties ekosistemon estas malsubtenata - ghia oficejo estis fermita.

Jen enkonduko en la problemon de germana publika televido-stacio ARD.

<http://www.tagesschau.de/weltspiegel316.html>

---

**Usona BP-naftokatastrofo en la Meksika Golfo** finighis, sed tamen la sekvoj dauros plurajn jarojn: la registaro jam denove permesas bori kaj eksplori nafton en tiaj profundaj areoj chirkau Usono. Elfluis dum la tri monatoj ch. 800 milionoj litro da kruda nafto en la maron - nur malgrandan parton (kiom?) oni povis kapti per diversaj metodoj. Ch. 1000 km da mar-bordo estas ankoraŭ naftigitaj; kaj miloj da homoj laboras je la purigado.

Sed oni ne scias kiom da fishoj, birdoj kaj aliaj organismoj pereis pro la nafto kaj la uzitaj kemiaĵoj. Ekz-e la nafto flosis en la regionon kie la larvoj de la rugha tun-fisho (*Thunnus thynnus*) naghas je la mara surfaco, oni kalkulis ke 20% da ili mortis pro tio; kaj oni ja scias ke tiu fisho jam trovighas je la rando de ekstermigho. (lau taz, 2010-10-20)

--

### **Faktoj pri la rugh-shlima katastrofo en Hungario, 2010-10-06**

1. La **ruĝa ŝlimo** estas naturaĵo, sed produktaĵo de homa agado. Nome ĝi estas flanka produkto de la aluminio-industrio.

2. Aluminion oni produktas el **baŭksito**. Tio estas plej ofte ruĝ-kolora, pro la enhavo de fer-oksido. La elminitan baŭksiton oni prilaboras en uzino de alumino. Ankaŭ la Uzino de Alumino de Ajkafunkcias per la plej vaste uzata teknologio, la *procezo Bayer*, fajn-grajne muelita baŭksito estas „kuirata” sub granda premo kaj alta temperaturo (240 °) en natria lesivo (**NaOH**). Rezultas du produktaĵoj, la blanka ŝlimo kaj la ruĝa ŝlimo.

3. La **blankaŝlimo** oni senakvigas. La rezultinta blanka polvo estas la **alumino**, Al<sub>2</sub>O<sub>3</sub>. Tion oni elektrolizas. Oni bezonas grandan kvanton da elektra kurento. La fina produktaĵo estas **metala aluminio**.

4. La **rugan ŝlimon**, diversgrade kaj diversmaniere sekigitan, oni enigas en stokbasenojn (t.n. kazed-ojn). La konsiston ni demonstras per ekzemplo de sekigita ruĝa ŝlimo el baŭksito de Iszkaszent-györgy.

Kemia Konsisto / pez-%		Mineralogia	
Al <sub>2</sub> O <sub>3</sub>	14,4	Hematit	33,0
SiO <sub>2</sub>	12,5	Goethit	6,0
Fe <sub>2</sub> O <sub>3</sub>	38,0	Na-Al hidrosilikátok	32,0
TiO <sub>2</sub>	5,5	Böhmit	0,8
perdo pro ardigo	9,6	Diaszpor	0,9
Na <sub>2</sub> O	7,5	Ca-Al szilikátok	12,5
CaO	7,6	CaTiO <sub>3</sub>	7,0
Aliaj	4,9	Kalcit	3,0
		Egyéb	5,0

5. La **titanio-enhavo** de la ruĝa ŝlimo estas el la vidpunkto de la homa sano indiferenta, ĉar la titanaton de kalcio la homa organismo ne absorbas. Aliaj, vere toksaj **pezaj metaloj** (plumbo, kupro, zinko, kromo, kadmio k.a.) ĉeestas en la originala baŭksito kaj en la ruĝa ŝlimo tre etkvante, nur kiel mikro- aŭ spur-elementoj. Ties koncentritecon oni kutime esprimas per *ppm* (miliono parto), alitermine *g/t* (gramo po tono). En nia kazo tiuj valoroj estas en la magnecordoj de 10 ppm kaj 100 ppm (milono, respektive centono de procento). Tio estas larĝe sub la konvencie akceptita limvaloro. Tio validas ankaŭ pri la **radiaktivaj elementoj** (ekz. Th, torio).
6. En la stokejon oni metas ne polvon, sed tre koncentritan lesivan **suspension**. La problemo estas ties pH, kio estas inter 12 kaj 13,5. Laŭ la *Bazilia Interkonsento* pH > 11,5 estas „*hazardous*”, riska, danĝera. Nome la tre koncentrita lesivo havas kaŭstikizan efikon: en kontakto kun homa aŭ besta organismo ĝi atakas la ĉelojn de la haŭto kaj/aŭ de la muk-membrano. Rezultas damaĝoj similaj al la brulvundoj. Ankaŭ la vivularon de la riveroj damaĝas la koncentrita lesiva naturo de la ruĝa ŝlimo (formorto de fiŝoj).
7. La **gipsoreagas** kemie kun la natria lesivo. La rezultanta natrio-sulfato estas kemie neŭ-trala.
8. La ruĝa ŝlimo, kiel tre lesiva suspensio, minacas la provizon de trinkakvo: la **grundakvon**, kaj eĉ la **karstakvon** entenatan per la kavaĵ-sistemo disvolviĝinta en la dolomitoj kaj kalkoŝtonoj de la montaro Bakony.
9. La sekiĝinta ruĝa ŝlimo polviĝas, la vento povas kapti kaj forblovi ĝin. En kazo de longdaŭra enspirado, ĝi povas damaĝi la **spirorganojn**,
10. La surfacon de la jam sekaj stokejoj oni devas **rekultivi**, planti sur ĝi konvenajn kreskaĵojn. (Iau Prof-o d-ro Endre Dudich, or-diploma geologo, diplomita instruisto pri biologio kaj kemio, eksa direktoro de la Centra Laboratorio de la Baŭksitesplora Entrepreno en Balatonalmádi)

**Komento de AVE (mw):** Do, unu plia en la serio de kemiaj katastrofoj, kvankam eble ne tiom longdaŭra (krom por la familioj de la mortintoj kaj fiŝoj kaj aliaj bestetoj, kaj agrikulturado.

Mi mem estas/is kemiisto, sed laboris nur en laboratorio; ni devus anticipi la industrian uzadon de la kuir-receptoj, kaj ke "poto" pofas havarii au eksplodi.

Do, kion fari por ĝenerale eviti tiajn katastrofojn (pli da betono por la ŝlimo-lagoj - estus nur la plej urgha riparado). Necesas prepari la restajhon tiel ke ghi restas ne-danĝera "eterne". Tio signifus: neutralizi kaj - je tiu rugha ŝlimo - ekstrakti arsenon, hidrargon (kiuj ne trovighas en la tabelo, sed en la ŝlimo - sub "aliaj") ktp. kaj prepari stabilajn oksidojn, ... au uzi la materialon. Kultivi la basenojn post la sekigado nur "eblas" kiam la seka restajho estas ne danĝera por la grundakvo. Basenoj povas krevi iam. NRO pri la Rajto de la Tero (kaj landoj) koncerne **ekstraktajn industriojn** - rilate minado, nafto-ekspluatado: <http://www.earthrights.org/>

### --- Tutmondaj informoj pri natur-media politiko kaj NRO-oj ---

Tutmondaj informoj pri **natur-media politiko de UN:** (cn, en, es, fr) <http://unep.org>

#### Usonaj naturprotektadaj NRO-oj:

Earth Island Institute (1982), NRO en Berkeley (US-Kalifornio), fondita de David Brower (+2000), instigas kaj subtenas projektojn al daŭripova uzado de la planedo Tero por chiu vivantajho.

(en) <http://www.earthisland.org>

kaj Sierra Club, kiu chefe okupighas pri naturprotektado en Usono: (en) <http://www.sierraclub.org/>

## En Europo:

**Naturopa** - de la Europa Konsilio: tie vi trovas multajn ligojn al naciaj kaj internaciaj tutmondaj NRO-oj: <http://www.naturopa.eu>  
Ezemple pri Ekoturismo: <http://www.naturopa.eu/ecotourism/>

Ekologio, Biodiverseco, Poluado: **Natura 2000**

Jen multaj dokumentoj de la EUropa Komisiono pri natura medio:  
<http://ec.europa.eu/environment/nature/natura2000/>

Bedaurinde plej multaj tekstoj estas nur en la angla - je la komenca pagho oni povas elekti el la europaj lingvoj - almenaŭ por la ekranaj kapvortoj.  
[http://ec.europa.eu/environment/index\\_en.htm](http://ec.europa.eu/environment/index_en.htm)

Jen estas pagharo kie vi povas elekti vian lingvon kaj la temojn:  
[http://www.eea.europa.eu/de/publications#c9=all&c14=&c12=&c7=de&b\\_start=0](http://www.eea.europa.eu/de/publications#c9=all&c14=&c12=&c7=de&b_start=0)

Jen estas datumbazo - denove nur en la angla: <http://www.eionet.europa.eu/helpdesk>  
ekzemple jen la Centro pri daurigebla konsumado kaj produktado: <http://scp.eionet.europa.eu/>

Internacia kunlaboro por protekti la naturon en Europo: (de, en - kun internaciaj ligoj)  
<http://www.euronatur.org>

### --- Agrikulturo, Nutrado, Sano ---

ELIANT sukcesis transdoni pli ol 1 miliono da subskriboj por ilia EU-Civitana Iniciativo al la EU-Komisaro pri Sano kaj Rajtoj de Konsumantoj, John Dalli. Ili postulas akcepti la **antroposofiajn rimedojn** kaj metodojn enkadre de la EU-Regularo; temas pri: Agrikulturo, nutrado, sano, edukado, saniga pedagogio kaj esploro: <http://www.eliانت.eu>  
(laŭ ELIANT 2011-05-13 )

2011-03 **Kreskolimigo de la homa populacio** bezonata: En multaj mondregionoj oni spertas la mankon da bona trinkakvo kaj nutraĵoj - temas pri politikaj kaj naturaj problemoj. Chiu registaro devus havi respondecan populacian politikon, kiu ĝenerale celus al kreskolimigo, prefere surbaze de libervolaj familiaj decidoj, sed tion devas subteni bona socio-politiko. Eble jam ekzistas studoj kiom da homoj povas toleri iu regiono - lasante ankau parton de la lando kaj resursoj al la naturaj sistemoj. Ne-respondeca kresko gvidas al fughado au militoj  
(laŭ teksto de Otto Vaske, red. de AVE)

Komento (AVE/mw): Oni vidis en Chinio, ke la severa unu-infano-limigo unuflanke sukcesis, aliflanke nun estas tro multe da viroj - pro la stulta ideo ke vira heredanto pli gravas ol ina. Ofte instigas la religiaj aŭtoritatoj al mult-infaneco - ĉar tiel kreskas ilia "grego". Do, estas tre komplika temo.

---

2010-10-23: Mi persone - kaj AVE ĝenerale - interesigas je evoluo de ekologie produktebla **fibro el urtiko**; kion oni uzis en antaŭaj jarcentoj; kaj nun sukcesis fajnigi ĝin dank al teknika progreso. Ĝi estas pozitive por la ekologio, ĉar kulturita urtikono eblas sur malbonkvalitaj grundoj en norda & meza Europo; urtikono anstataŭas kotonon kaj la fibroj havas ege bonajn ecojn - ekz-e respiri akvon pli bone ol kotonono au lano.

---

**GMO herbicido** Glyphosat (glifosat) eble malfortigas la plantojn majzon kaj sojfabon, kaj raportas pri problemoj je la nutrataj bestoj (ankorau mankas konfirmo). Prof-o Don Huber raportis al administracioj de Usono kaj EU:

(en) <http://www.gmwatch.org/latest-listing/1-news-items/13024>

(de) [http://www.oekonews.at/?mdoc\\_id=1058005](http://www.oekonews.at/?mdoc_id=1058005)

(2011-05-08)

2011-03-18 la Germana Federacia Konsilio votis **por pura semaro (sen GMO-polucio)**  
Kelkaj federaciaj landoj volis moligi la pureco-leghon rilate semaro; t.s. semoj ne rajtas enhavi gen-  
teknike modifitaj semoj.

Kelkaj semajnoj antaue okazis - bedaurinde - abolicio de la limvaloroj kiom da GMO-semoj rajtas  
esti en la nutrajho por la brutaro (detaloj ...).

Por faciligi la eniron de GMO-semoj en la merkaton kelkaj germanaj - ankoraŭ kristandemokrate  
regataj landoj - postulis abolicion de la legho, kiun enkondukis la verd-rugha registaro (mia supozo)  
ke semaro tute ne rajtas enhavi GMO-semojn. Kompreneble la GMO-lobio ne shatas tiun baron  
kontraŭ la GMO-inundo. Tiu sukceso estis atingita dank al multaj protestoj de konsumantoj kaj de  
la ekologie laborantaj agrikulturistoj:

<http://www.campact.de>,

<http://www.saveourseeds.org>

---

### **Komposto plibonigas la grundon,**

bruligo de kompostebraj organikaj materialoj signifas daŭran perdon:

Jen iniciativo GAIA kiu kampanjas kontraŭ la bruligo de komposto:

<http://www.no-burn.org/1116>

Komento AVE/mw: pli bona alia metodo - kolekti organikajn restajhojn el kuirejoj (kaj urbaj  
ghardenetoj), je fermentado produktighas biogaso (metano ...) kaj la postrestajhoj havas altan  
valoron kiel komposto.

---

**Elektrosmogo** - kelkaj spertas ghin, aliaj ne - sed certe ghi havas efikojn simile al mikro-ondaj  
forno - dependas de la frekvendo kaj pulsanta au konstanta sistemo. Ekzistas esploroj rilate abelo  
k.s., kiu montras ke ili malbone toleras elektrosmogon. Jen kelkaj ret-ligoj:

(de, en) <http://www.buergewelle.de>

<http://www.buergewelle-schweiz.org>

(de) <http://www.salzburg.gv.at/umweltmedizin>

(la 6 UN lingvoj) <http://www.who.int/peh-emf/en/>

(en) <http://www.princeton.edu/~ota/disk1/1989/8905/8905.PDF>

---

2011-03 **Fishoj mortas en la rivero Doubs** (orienta Francio):

Evidente la najbaraj kampoj estas troe nutritaj - ofte per la kotajho de grandaj porko-bredejoj, kaj  
tial fluas tro multe da nutrajhoj en la riveron. Tio kauzas fungo-malsanighon de la fishoj. Shajnas,  
ke ankau kemiaj rub-fluoj de la horlogho-industrio kunagadas. Kaj krom tio temas pri strecho pro  
tre diversa akvo-kvanto kauzata de la akvofortejo en Chatelot, kiu nun apartenas al usonaj  
investoroj kiuj maksimumas la profiton. (Iau B. Nueckles, BZ, 2011-03-09)

---

Favore al **medio-, sano-, besto-, biodiverseco-, klimato- kaj justeco-afabla Agrikulturo** vi  
trovas jen pagharojn

(parte plurlingvaj ligoj) <http://www.meine-landwirtschaft.de/wir/traeger.html>

kaj asocioj kiuj engaghighas por daurigebla civila socio:

(parte plurlingvaj ligoj) <http://www.meine-landwirtschaft.de/positionen/zivilgesellschaft.html>

(de) <http://www.abl-ev.de/>

---

2011-01-15 **Bio-fuelo kaj pluvarbaroj:**

Internacia Siglo por ne-protekti la pluvarbarojn kontraŭ bio-fuelo (ISCC). Tiu siglo estis evoluita de  
la germana Ministrejo pri Agrikulturo kaj Konsumantoj. Ghi celas al internacie aplikebla, praktikebla  
kaj travidebla sistemo por certigi biomason kaj biofuelon:

Ghi rilatas al: redukto de forcejgasaj emisioj, daurigebla kultivado de la areoj, protekto de la natura  
biosfero, kaj la socialan daurigeblon. Do, ne teorie ne malbone - kaj jen ilia retejo:

(de, en, es) [http://www.iscc-system.org/e868/e1180/index\\_ger.html](http://www.iscc-system.org/e868/e1180/index_ger.html)

Vi povas komenti ankaŭ rekte al ili.

Sed la internacie ligita asocio por protekti la pluvarbarojn, Rettet den Regenwald, protestas akre, ĉar en la asocio kiu organizas ISCC-n sidas Cargill, unu el la plej grandaj detruantoj de la pluvarbaroj en Indonezio por produkti palm-oleon. Ilia retejo ankaŭ havas tutmondajn ligilojn.

(de, e, es, pt) <http://www.regenwald.org/>

Tie vi trovas la paghon por protesti kontraŭ tiu afero de korupteco. Jen germana eldiro: "fari la kapron gardisto". La firmao reagis al mia letero al ili, dirante, ke nur la plantaghoj kaj oleo-muelejoj de Cargill sur Sumatra estis certigitaj de ISCC.

---

**2011-01-14 Plasto en Mediteraneo:** La MED Ekspedicio 2010 / 2013 estas scienca, ekologia kampanjo de dek Eŭropaj esploraj laboratorioj. Ĉi tiu programo, unua tia en Francio kaj Eŭropo, reliefigas alarmigan fenomenon en la Mediteraneo: la ĉeesto de kvazaŭ-nevidebla poluado kiu tutverŝajne eniros en la manĝaĵo-ĉenon - poluado de plasta mikrorubajho. La unua aro da analizoj faritaj de Ifremer (la Franca Instituto por Mara Esploro) kaj la Universitato de Liege (Belgio) taksis ke ĉirkau 250 bilionoj (da) flosantaj mikro-plastajhoj kontaminas la surfacon de la Mediteraneo. Ĉu la Mediteraneo fariĝas plastaĵo suprenstomakigata de fiŝoj kaj eĉ de planktono, la bazo de la tuta nutraĵo ĉeno ?

Por atingi la celojn de "Scio pri la Maro 2020" (Marine Knowledge 2020) kaj minimumigi difektojn, ŝajnas esence okupi homojn de Mediteraneaj landoj, kaj ankaŭ la Eŭropan Komunumon, por starigi efikajn leĝajn rimedojn decide gravajn por gvidi kaj helpi la socion pli bone administri ĉi tiun situacion.

Oni celas kolekti milionon da subskriboj, kiuj necesas laŭ la nova EU-regulo por peticio al la Europa Parlamento: Bonvolu subskribi la Europunan Peticion (ankoraŭ en la angla, franca, kaj hispana, sekvas germana, pola, k.a.)

(en, es, fr, aliaj sekvas) <http://www.expeditionmed.eu/petition/index.php>

kaj bonvolu pludoni la informon al viaj konatuloj.

Se vi ŝatas subteni la organizantojn per traduko en vian nacian lingvon, bonvolu skribi al ili.

Eble vi jam scias ke mi (Manfred Westermayer) jam prelegis pri tiu temo plurfoje, kaj jen la prezentajho en Esperanto: <http://www.verduloj.org/akvo.htm>

**2011-01-14 Germanio & Nederlando: Dioksinoj en ovoĵ kaj porkoviando:**

La amasa tenado da kokinoj kaj porkoj k.a. postulas ankaŭ la amasan uzadon da industria nutraĵoj por ili. Preskaŭ ne plu la surlokaj agroj kaj herbejoj servas nutri ilin. Kaj la pli amasa postulo al malmultekostaj ovoĵ kaj viando subtenas tian tendencon. Je la jarfino 2010 montrighis ke graso por amendi la bruto-nutraĵon entenis (tro) multe da dioksino, kiu sekve ankaŭ estis trovita en la ovoĵ, kokinoj kaj la porkoviando el multaj bredejoj en norda Germanio.

Oni jam scias: La firmao Petrotec kolektas grasajhon kaj uzitajn oleojn el kuirejoj kaj fritujoj, eble ankaŭ el mortitaj bestoj. Ili produktas bio-dizelon kaj glicerolon; sed kelkaj el la gras-acidoj ne taugas por dizelo, kaj tiuj estas vendataj kiel graso por industria uzado. Verŝajne tia graso estis aĉetita tra iu nederlanda firmao de germana firmao kiu produktas bruto-nutraĵon - ili profitas, ĉar tia porteknika graso kostas nur la duono kompare kun iu kiu devenas rekte de plantoj.

Sed kiamaniere envenas dioksino en la grason ? Dioskinoj (ni rememoras al la Seveso-Katastrofo, TCCD) produktighas kiel nedezirata kromprodukto ekz-e kiam klorizitaj fenoloj estas hejtigitaj (sub iuj kondiĉoj) kaj ankaŭ se plasto-rubajhoj (Polivinilklorido) estas bruligitaj sub ne-taŭgaj kondiĉoj. Novaj rubajh-bruligejoj uzas aparte altan temperaturon por plene detruu dioksinojn . Dioskinoj kolektighas en graso de fiŝoj kaj bestoj (do ankaŭ en homoj), tiel ili venas supozeble ankaŭ en la uzitajn fritoleojn. Ili estas troveblaj en ĉiaj grasajhoj de la vivantaro en diversaj koncentrecoj. Pli multe en tiuj de fiŝoj kaj bestoj. La sano-minaco dependas de la kvanto kaj pozicio de klor-atomoj. (laŭ taz (k.a.) 2011-Januaro)

Rimarko AVE/mw): Escepto estas la tenado laŭ "Biologia"-agrikulturo; sed ankaŭ tie iam okazis poluo de la nutraĵo per dioksin-enhava greno. Do, pli akraj reguloj kaj kontroloj necesas; kaj necesas manghi malpli da bestoproduktoj - au eĉ tute ne laŭ la praktiko de la adeptoj de veganismo. Ĉiukaze oni vidas la minacojn kiam nutraĵoj estas produktataj ne per lokaj rimedoj.

### **Usono, Britio, EU, k.a.: For-mortado da abeloj kaj burdoj.**

La nombro de 4 specioj da abeloj reduktighis draste (ghis 96% ). Ankoraŭ oni ne scias precize kial, sed sciencistoj supozas ke la uzado de pesticidoj malfortigas la abelojn kaj tial ili estas malpli stabilaj kontraŭ infekcio-malsanoj. Krom tio la agrikulturo pli kaj pli reduktas la biodiversecon: la kampoj ighas pli grandaj, multaj herbejoj ne plu montras la variecon da sovaghaj florherboj pro tro forta nutrado kaj tro frua kaj ofta falchado. Pro la apliko de kelkaj pesticidoj (2008 en Germanio) oni jam spertis morton da multaj abel-svarmoj pro la aplikado de Clothianidin (neo-nikotinoideo). EU subtenas la esploron. (Guardian (GB), 2011-01-03)

<http://www.eu-umweltbuero.at/>

<http://www.sonnenseite.com> > serchu "Bienen"

---

**Resursoj en la Arkta Regiono:** multaj ŝtatoj okupighas sekurigi parton de tiu areo por si. La verda Pens-fonduso en Germanio, Heinrich Boell kolektis la datenojn pri tiu regiono. Aparte grava estas ke la ekologio en tiu regiono estas tre sentebla, chu temas pri la balenoj, chu pri ursoj, sed ankaŭ la fiŝoj kaj aliaj organismoj kiuj vivas sur la fundo de la maro estus trafitaj de la ekspluatado.

EU devus partopreni en la Arkta Konsilio (2010): <http://www.boell.eu>

### **2011-01-02 AGENDO 21:**

Kiel vi eble scias, AVE jam ekde 1998 proponas amendon de la UEA-Statutoj per la temo "daurigeblo" - laŭ la Pinto-Kongreso pri la tutmonda naturmedio en Rio 1992 kaj tiu en Johannesburg 2002 (se mi ne eraras).

Ni jam prezentis nian deziron al UEA por pritrakti ghin enkadre de la venonta UK en Kopenhago. Intertempe ni vidas ke tiu temo ighas pli akra. Jen nur kelkaj gravaj terminoj por nia estonta mondo:

(en) resilience = rezistopovo

(en) sustainability = daurigeblo

(en) subsidiarity = laueble loka memzorgo

(en) serendipity = prudenta akcepto de (ne-tuj-evidentaj) chirkauantaj informoj

Kiel vi certe scias la mondo havos du gravajn problemojn (kiuj afektas ankaŭ aliajn sferojn): "Peak Oil" = nafto-pinto: la ekspluatado de nafto sinkas (chu jam ekde 2006, chu post malmultaj jaroj), kaj aliflanke la bezono altighas !

Klimato-Shanghigho: pro la efiko de diversaj forcejdomaj gasoj, kiuj venas de la homaj kaj industriaj aktivecoj, la tutmonda averagha temperaturo altighas. Jam nun pliakra estas la klimataj katastrofoj (inundoj, fajroj).

Se oni traktas tiun du temojn aparte sekvas konsiloj kiuj kontraŭdiras unu-la-alian.

Necesas respekti la severecon de tiuj estontecaj problemoj kunligite. Laŭ Rob Hopkins "Transition Handbook" necesas altigi la rezistopovon de nia tutmonda socio kaj samtempe redukti la eligon de forcejdomaj gasoj (CO<sub>2</sub>, CH<sub>4</sub>, CxFyClz, ktp); jen surŝafa nur kelkaj ideoj:

1. Reiri al regiona kaj loka ekonomio - komence de la varoj por nia homa vivo, kunloka mono.
2. Limigi la uzo-raĵojn de energio (el resursoj kaj kampoj)
3. Malcentrigi la energio-produktadon, anstataŭ investi miliardojn en novajn kontinentajn retojn; redukti la bezonon da energio
4. Re-klerigi pri teknikoj de memzorgo

### **2011: La Internacia Jaro de la Arbaroj.** Jen la rezolucio de UN:

(8 UN-lingvoj) <http://www.un.org/en/events/iyof2011/resolution.shtml>

Koncize (AVE/mw): Arbaroj produktas oksigenon kaj filtras la polvon el la aero; ili mildigas la klimaton; ili subtenas ke pluvos; ili retenas la akvon pli longe kaj preventas la erozion; naturaj arbaroj estas perfekta ekosistemo kaj hejmo por multegaj bestoj, birdoj, insektoj kaj aliaj organismoj; kaj finfine donas lignon kaj ghojon por la homaro.

Praarbaro - kaj pli au malpli natura arbaro - estas multe pli ol nur aro da arboj, kion ni nomu forsto.

2010 -12 EU, Bruselo:

Pluvo de subskriboj sur la Eŭropan Komisionon por **obteni moratorion pri ĉiuj rajtigoj de Genetike Modifitaj Organizmoj (GMO)** en EU.

La peticion, subskribita de unu miliono da EU-civitanoj, liveris al la EU-registaro la internaciaj organizoj Greenpeace kaj Avaaz. Interalie ĝi eksplicite petas ke la moratorio daŭru, ĝis kiam ekfunkcios nova sendependa organismo je scienca kaj etika juĝado, por taksu la efikojn de la transgenetikaj plantoj sur sano, medio kaj agrikulturo.

La respondeculino de Greenpeace precizigis ke «ni volas sekurajn nutraĵojn kaj subteneblan agrikulturon sen Gmo. Ni nun atendas ke la EU-institucioj pli okupiĝu pri la gravaj problemoj de la vivo en la Unio, pli ol pri la interesoj de la bioteknologiaj lobioj». Gvidanto de Avaaz aldonis ke «temas pri ege grava paŝo de la eŭropa demokratio. Ni atendas ke la Komisiono surprenu la petojn kaj preokupojn de civitanoj, eŭropaj registaroj kaj sendependaj sciencistoj».

---

2011-01-02 **Kotono-GMO ne plu funkcias.**

Ok jaroj post la enkonduko de Bollgard (GMO-Kotonsemoj de Monsanto) jam la dua evolu-shtupo de Bollgard, kiu devus mortigi la larvojn de koton-vermo, tio ne plu funkcias. Tio signifas ekonomian perdon por la koton-kulturistoj. <http://www.sonnenseite.com>

<http://www.global2000.at/site/de/>

---

**Agrikultura veneno Glyphosat:** grandskala kulturado de soj-faboj kaj plurfoja shprucado per aviadiloj de la total-herbicido Glyphosat kaŭzis malsanojn, astmo, kaj reduktitan kvaliton de spermoj. Intertempe la areo estas limigita, kaj tiel la malbonaj efikaj reduktighas. (lau taz, 2010-07-20, p.5) AVE/mw: Do, ne plu interesa ? Certe ekzistas pluraj regionoj kie oni ankoraŭ uzas la venenon - kiu estas ligita al GMO-plantoj kiel sojo, kolzo kaj aliaj. Do, se oni ne sukcesas malpermesi GMO-kulturadon, almenaŭ estu atenta pri la venenigo. (GMO = Genetike manipulitaj organismoj)

---

2011-04-27 **Internacia Tago Averti la Bruon:**

Jen la Charto de Linz (pri la bruoj en la publika spaco): (eo) [http://www.verduloj.org/Charto\\_de\\_Linz](http://www.verduloj.org/Charto_de_Linz) kaj jen pluraj aliaj ret-ligoj. Fondita de la Centro pri Audado kaj komunikado celas averti kontraŭ la minacoj de long-daŭra ekspozicio al bruoj, jen la ligilo al CHC

(en) <http://www.chcheating.org> , serchu sube je Event Calendar

(de, en, fr, it) <http://www.laerm.ch> , el Svisio

(en) <http://randacoustics.com/international-noise-awareness-day-april-27-2011/>

(en ?) <http://www.umweltbundesamt.de/uba-info-presse-e/2008/pe08-029.htm>

(de) <http://www.tag-gegen-laerm.de/>

(de) <http://filz.de.to/> , organizajho en Freiburg kun detalaj informoj

(de) <http://www.lautsprecheraus.de> ,

**Balenoj** kaj delfenoj ankau malshatas bruon: (diversaj lingvoj): <http://www.wdcs.org/>

**Silvestro** malpacigas - silvestraj krakoj eble mortigis birdojn, ghenegas aliajn bestojn, poluas la aeron, kaj malshparas resursojn. Jen ligo kun la diversaj argumentoj kaj dokumentoj:

(de) <http://stille-nacht-2011.eu.tc/>

### --- Ekologio & Ekonomio ---

2011-04 **Purigi akvon kaj produkti nafton.**

En la komunumaj akvo-purigejoj jam delonge oni uzas la putro-gason por produkti kurenton kaj varmon chefe por la uzinoj.

Esploristoj en usono esploris kiel produkti ne gason sed oleon. Kelkaj algo-specoj purigas la akvon kaj iliaj lipidaj (tipo da grasoj) estas konverteblaj en bio-oleon. Kompreneble tiam estas pli tikla trovi la konvenajn parametrojn - kompreneble ili bezonas fosfaton kaj nitratojn, kiuj kutime trovighas en la dommastrumaj poluakvoj. Jen detala artikolo pri tio. (dank' al Kurt)

[www.newscientist.com/article/mg21028075.300-a-single-source-for-clean-water-and-fuel.html](http://www.newscientist.com/article/mg21028075.300-a-single-source-for-clean-water-and-fuel.html)

2010-12 APC petas **atentigi, ke la komputila teknologio ne forkonsumu tro multe da papero kaj energio**. Global Information Society Watch: <http://www.giswatch.org>

**Elektronika rubaĵo - valorajho:**

[www.resourcefever.org/news/items/new-report-from-e-waste-project-in-ghana-now-available.html](http://www.resourcefever.org/news/items/new-report-from-e-waste-project-in-ghana-now-available.html)

### --- Trafiko, Transporto ---

La transportsistemo en EU estas alfrontanta verdan revolucion. Temas pri la nova plano por la subtenebla movebleco aprobita de la Eŭropa Komisiono. La ambicia celpunkto sume antaŭvidas antaŭ 2050 malpligon je 60% de poluaj eligoj de fosilaj la brulaĵoj utiligataj en la transportoj.

Por la aŭtoj estis fiksata la laŭgrada kompleta elimino de la benzinaĵoj kaj dizelaj motoroj. Por la aeraj kaj maraj transportiloj estas antaŭvidata la uzo de brulaĵoj je vegetara origino. Estos krome plifortigata la transportoj de varoj sur reloj aŭ sur rivero kaj estos kreaĵoj fervojaj koridoroj inter la najbaraj urboj kaj la havenoj aŭ fukhavenoj, tiel permesante al vojaĝantoj lasi hejmen la aŭtojn.

La Komisionano pri transportoj deklaris: "Transportoj 2050 konstituas vojmapon por konkurenckapabla transportsistemo povanta alfronti kreskantan subteneblan moveblecon malpliigante la eligojn. Ni celas interrompi la dependecon de petrolo de la transportsistemo sen rezignini efikecon kaj endanĝerigi moveblecon."

(2011-04-02, itala presagentejo, Tr.& red. J-K Rinaldo el Padova.IT.EU )

Komentoj AVE/mw: 1. Necesas ankau altigi la efektivecon, malpezigi autojn.

2. Malpli da transportoj, kiuj ofte okazas pro salajro-diferencoj, kaj merkato-rilataj kauzoj.

3. Uzi riverojn por transporto havas limon. Naturaj riveroj restu sen tiaj aranghoj kiujn oni bezonas por transport-shipoj; fervojo estas same efektiva.

---

### 2010-10-29 **Ekologia trafiko en Tajvano:**

Nun pri bicikloj. Sabaton, oni malfermos parton de rapidvojon por fari biciklan agadon por "plenkreskuligha ceremonio" de junuloj, bicikli longdistance. Cetere, antaunelonge, urbo Gaoxiong faris diskutforumon pri "verda trafiko", kaj invitis unu el la unuaj advokantoj de Senauta Tago, de Francio, por diskuto, kaj raportis tion en gazeto kaj radielsendo. (de Qiyao)

### --- Financoj, Impostoj ---

Pagharo de tutmondaj **sindikatoj** en Esperanto: <http://www.labourstart.org/eo/>

### 2011-4, **EU, Argumentoj por Europ-Uniaj impostoj:**

Gerhard Schick, MEP de la germanaj Verduloj argumentas jene favore al du impostoj por tuta Europa Unio:

Ghenerale, ke tiel chiuj devas pagi la saman procentajhon, kaj necesos malpli da mono el la shtataj kasoj - tiuj pagoj instigas kontrauecon al la EU.

Krome nur tut-EU-a imposto helpas eviti la serchon de alia sidejo por iuj firmaoj (malalt-impostaj insuloj ene de la EU):

- Financaj Transakcioj (Tobin-Imposto), kiuj ankau bremsas la rapid-tempan spekuladon,  
- Energio-impostoj, kiuj malnecesigas la t.n. fuelo-turisman (veturi al la najbara eksterlando por plenigi la benzinujon). (taz, 2011-04-17, p.18)

Komento AVE/mw: Krom tio necesas harmonigo de entrepreno-impostoj, kiu same sekvis en migrado de la firmaoj; ekz-e kemiaj firmaoj al Irlando. Stult-maniere la kondicho estis tiom favoraj, ke la lando mem ne sufiche profitis de tiuj uzinoj, krom eble pli da laborlokoj kaj salajro-impostoj. La Tobin-Imposto kaj energio-imposto devus esti ech tutmondaj, pro la tutmondaj konzernoj.

### 2011-03 **Por imposto je financaj transakcioj kaj kontrau imposta fraudo en EU:**

Sven Gigold (VRP & ATTAC) klarigis, ke multaj transakcioj okazas ene de EU.

Krome estis akceptita la raporto de Eva Joly (VRP) kontraŭ imposta fraudo (t.n. imposto-oazoj). (laŭ taz, 2011-03-09, p.8)

Imposto sur financaj transakcioj: Ja la plenkunsida EP en Strasburgo hieraŭ aprobis je granda plimulto FTT-on (imposto sur financaj transakcioj). Ne temas ankoraŭ pri leĝa EU-decido, sed pri rezolucio, laŭ kiu EP invitis la Eŭropan Komisionon alpreni kaj promocii je monda nivelo la novan imposton, laŭ antaŭvidebla kvanto je 0.05% de la financaj profitoj. Kvankam la procento povas esti tre malalta, la imposto estas ege grava, se oni konsideras ke ĝi nuntempe ekzistas nur en malmultaj landoj en la mondo, i.a. en Britio kaj Svislando.

Gravas ankaŭ ke la parlamentanoj enigis en la rezolucion la klaŭzon ke ĝi devus esti aplikota eĉ se la imposto ne estus adoptota je monda nivelo.

Ja la ECB (Eŭropa Centra Banko) ĝin malfavoris, ĉar ĝi riskas devojigi la investantojn al fiskaj paradizoj. Sed la parlamentaĵoj reagis subtenante, ke per ĝi EU sin liberigus el spekulaj financaj transakcioj kaj plibonigus la efikon de la financa EU-merkato. Nun la rekomendo devus esti transformata fare de la Eŭropa Komisiono en oficialan proponon al la du leĝdonaj ĉambroj de Eŭropunio, t.e. la EP mem kaj la Eŭropa Konsilio. I.a. la rezolucion petis ankaŭ:

- lanci la obligaciojn "eurobond", por malpliigi la impost-eviton kaj impost-fraŭdon:

- enigi la imposton "Carbon Tax" (imposto sur bruligo: karbo, nafto, metano) ).

Angela Merkel tuj petis ke tiu imposto estu ekzamenota jam en la pintkunveno de la eŭroareo je la 14a de marto. Tuj aprobis ankaŭ la Kunfederacio de la eŭropaj sindikatoj, la ĉefa promocianto.

En la tago de la virinoj, signifoplenaj jenaj du reagoj:

- la greka eŭrodeputitino Anni Podimata deklaris ke "nuntempe la financa sektoro estas malŝarĝita de kiu ajn taksado kaj ĉijare - malgraŭ la financa kaj senlabora krizo - tiu sektoro ĝuis profitojn eĉ superajn al tiuj antaŭ-krizaj";

- la respondeculino de la EU-oficejo pri NRO (NeRegistaraj Organizaĵoj) deklaris ke "temas pri grava novaĵo. EU povos helpi per tia imposto al milionoj da homoj malriĉigintaj pro la bankistoj".

#### --- Interreto ---

**Por libera interreto** en de EU estas la Socialistoj, kaj Verduloj/Regionalistoj & Piratoj (VRP):

<http://groups.google.com/group/EU-federo>

(de J-K Rinaldo (Europaj Federistoj, kaj AVE)

Kontroli kaj **informi pri lobiistoj** / ankaŭ temas pri "whistleblowers" - **faifistoj**:

(de) <http://www.lobbypedia.de> , (de) <http://www.lobbycontrol.de>

#### ----- Demandoj & Petoj & Privataj informoj -----

Chu iu el vi estas kamparano en meza-orienta Europo, au chu vi konas iujn.

Estas grupo "**europa reto de junaj kamparanoj**" kiu serĉas kontakton kun aktivistaj kamparanoj en tiu regiono: <http://www.reclaimthefields.org>

Vi povas skribi al <umweltschutz-von-untent@listi.jpberlin.de>, sed ili eble ne komprenas Esperanton - eble kopiu al mi <ave@verduloj.org> kaj ronaldo, kiu sendis la informon por ebla traduko. <ro-esp@dds.nl>

Mi rememoras al kamparanino kiu zorgis por la bongusta **bio-vegetara nutraĵo dum la UK en Zagrebo, 2001.**

---

Ginette skribis: mi ja esperantigis la notojn sub la fotojn de la **mond-voĵaghantoj Alice kaj Cedric**, por parto de la voĵago kiu iras de Kambogho al Tunizio; mi intencas esperantigi la restantan parton laŭ mia libera tempo. De nun, ne nur la francaj verduloj povos ghuji la rigardadon al tiu tre interesa retejo: (eo, fr) <http://www.everyoneweb.fr/portraitdeplanete>  
rubriko: photos, Amike salutas, Ginette.